

Protokolo de la Komitato de ILEI en Kunmingo, sesio 1

Ĝi okazis en Salono Szerdahelyi, inter 11.00h kaj 12.30h, la 21an de julio, 2012

1. Bonveniga saluto de la prezidanto

Ĝi inkluzivis salutojn de la estraranoj kiuj planis sed ne povis ĉeesti.

2. Kontrolo de la kvorumo

Kvorumo estas 17 voĉoj. La 17 kunvenintaj personoj portis voĉojn por 29 komitatanoj, do la kvorumo estas kontentiga.

3. Definitivgo de la tagordo

Ĝi estas senmodife akceptita.

4. Elekto de protokolanto

S-ro LEE Jungkee el Koreio estas elektita.

5. Akcepto de la protokoloj de Kopenhago

Tiuj estis jam akceptitaj rete, ili estas unuanime konfirmitaj.

6. Resumo kaj konfirmo de komitataj retdecidoj

Okazis 26 decidoj en 5 sesioj de post aprilo 2011. Unu post unu, tiuj decidoj estas konfirmitaj. Ĝi inkluzivas la akcepton de buĝeto 2012 – konfirmita unuanime – kaj serio de modifoj al la statuto kaj interna regularo – konfirmitaj unuanime.

7 Komentoj pri la sperto de reta voĉdonado

- * Mirejo gratulis pro la akcepto de retvoĉdonado en ILEI kaj la fakto ke ILEI jam kuraĝis konferenci en Afriko.
- * Moerbeek : Temlinie devas esti klara indiko pri voĉdonado de ILEI kun voĉdon-instrukcioj (*Postnoto: tion jam dekomence ni praktikas: VDON-KOM. Ĉiu voĉdono entenas precizajn klarigojn kiel voĉdoni kaj al kiuj sendi.*)

8. Starigo de dumkonferencaj komisionoj

- * Mirejo demandas pri la funkciado de ILEI ĉe Unesko kaj ricevas respondon.
- * Oni pripensas starigi dumkonferencan komisionon pri UN kaj Unesko, sed konkludas, ke mankos tempo por ĝia kunsidado.

9. Honoraj membroj de ILEI

La estraro apogas du proponojn, venintajn el la ĉina sekcio. Li Weilun kaj Laŭlum el Ĉinio – ambaŭ akceptitaj unuanime kun aplaŭdo. Moerbeek proponis, ke konferencanoj sendu konsolan mesaĝon al Laŭlum kun subskriboj. LKK konsentas pretigi tion.

10. Modifo por la interna regularo

La tri proponoj de la estraro estas unuanime akceptitaj, nome:

Nova punkto estas aldonita:

4.9.4 La Estraro nomumas kaj malnomumas la redaktorojn de siaj revuoj kaj aliaj kompilitaj eldonaĵoj.

La Komitato konsentas aldoni la sekvan frazon fine de punkto 7.1.6:

La estraran elekton gvidas la prezidanto aŭ membro de la Elekto-Komisiono, aŭ – manke de tiu – alia komitatano, kiu ne estas kandidato por estrara posteno.

La Komitato konsentas modifi la trian kuglotekston sub 7.2.2.1 jene:

La Prezidanto ... reprezentas la Ligon en eksteraj rilatoj →

La Prezidanto ... reprezentas la Ligon en eksteraj rilatoj, sed rajtas delegi tiukampajn taskojn.

11. Trakto de eventuale venintaj aliĝpetoj de sekcioj

Alvenis petoj el Mongolio kaj Vjetnamio, kun intenco ricevi peton el Nepalo.

- * Mirejo proponis nomumi komisionon por kontroli ĉu la statuto de novaj sekcioj estas akceptebla aŭ ne kaj ŝi konsentas labori en tiu komisiono. La komitato preferas nomumi komisiiton. Mirejo estas nomumita kiel komisiito de la komitato dum tri jaroj, tra la mandato de la nova estraro.
- * Aktuale la ekzisto de sekcia statuto ne estas devigata, sed tre dezirinda. La taskaro de la komisiito inkluzivas pli ol la statutan kontrolon, kiel difinite en gvidilo (*Noto: Tiu estas jam verkita kaj legebla en la liga retejo ĉe <www.ilei.info> sub 'Dokumentoj > Gvidiloj' .*)
- * La mongola sekcio kun ses internaciaj membroj estas akceptita sub la kondiĉo, ke ili sendu sian statuton al la ĵus nomumita komisiito de ILEI. – akceptita unuanime.
- * Aliĝpeto de vjetnama sekcio estas akceptita sub la kondiĉo, ke Vjetnamio same liveru sian statuton al la komisiito. – akceptita unuanime

13.1. Pri la Internacia Ekzameno-Komisiono

Mirejo raportis ke IEK bezonas rekonsistigon por la periodo 2012-2015. La komitatoj de ILEI kaj UEA devas ambaŭ akcepti la proponitojn. Ŝi prezentis 7 kandidatojn:

Mireille GROSJEAN, Svislando, prezidanto
Monika MOLNAR, Hungario- Svislando, vicprezidanto
Karine ARAKELIAN, Armenio, sekretario, arkivisto
Leysester MIRO, Venezuelo-Brazilo
Giridhar RAO, Barato
Jérémie SABIYUMVA, Burundo
Han ZUWU, Ĉinio

La Komitato unuanime akceptis la proponon. Detalojn pri la funkciado de la ekzamenoj Mirejo donos en sia faka kunsido.

La kunsido estas fermita je 12.35. Sekva sesio: marde la 24-an de julio.

Bazo: <PROT-KUN sesio 1.pdf> de s-ro LEE.
Prezentita: <PROT-KUN sesio 1 LJK-SMG.pdf>.
Al kontrolo: 23a de julio 15.15. Al distribuo: 24an de julio 01.05.
Tiu versio estis akceptita en la tria, jaŭda kunsido de la komitato.
Lingva poluro: <PROT-KUN sesio 1 LJK-SMG-RM.pdf>, 13an de aŭgusto 2012.